

KATOLIKA ESPERANTISTO

★ Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E. ★
(Association Catholique Française pour l'Espéranto)

Prezidanto: S-ro R. Cl. COLAS 6, rue de Mézières 75006 PARIS
Sekr.: S-ro R. DESPINEY 43, quai de Champagne 94170 LE PERREUX-sur-MARNE
Kasistino: S-ino J. VINCENT B. P. 54 49150 BAUGE
Peranto: IKUE: P-ro R. DEGRELLE B. P. 23 54510 TOMBLAINE
C.C.P. Association Catholique pour l' Esperanto 2324 93 N ROUEN.

==== la n^o: 4 F. Abono: 15 F. Kotizo: 5 F. Sume: 20 F. ====

+++++

N. B. La materialon por la bulteno oni sendu al S-ino Vincent antaŭ la 10-a de februaro, majo, aŭgusto kaj novembro.

+++++

==== N^o 134 ==== BULLETIN TRIMESTRIEL ==== TRIMONATA BULTENO ====
*** Sankta PIO X-a, preĝu por ni. ***

==== SEPTEMBRO 1982 ====

+++++

BILETO DE LA PREZIDANTO

Le congrès de l' Union Internationale Espérantiste Catholique a eu lieu à Lille, du 17 au 23 juillet, sur le thème de la PAIX; les participants ont médité ensemble sur les actes et les attitudes propres à favoriser le retour de la paix dans la Société et dans le Monde.

Ils ont prié ensemble, en union avec tous ceux que les forces d'oppression privent des droits élémentaires individuels et collectifs.

Ils se sont unis dans la célébration quotidienne de l' Eucharistie, dans le chant des heures liturgiques, dans la vie amicalement partagée, prêtres, religieux et laïcs venus de l' ouest et de l' est, de 12 nationalités, tous proches les uns des autres grâce à la pratique de la langue commune.

Un certain nombre d' entre eux ont ensuite participé au Congrès Universel qui s' est tenu à Anvers; une messe a été célébrée par Monseigneur Miziolek, évêque auxiliaire de Varsovie et des prêtres de différents pays, en présence d' une nombreuse assistance. Des contacts oecuméniques ont eu lieu entre chrétiens de diverses confessions, la langue unique étant l' Espéranto.

Ces congrès sont la démonstration que les personnes de tout âge, de toutes conditions, de toutes opinions, peuvent partager l' usage d' une même langue dans un fraternel pluralisme.

Dès le premier congrès, à Boulogne-sur-Mer, en 1905, l' épreuve et la preuve étaient faites de l' intérêt et de l' utilité de la langue de Zamenhof; grâce à l' appel de l' abbé Peltier, et dès ce moment, les chrétiens ont toujours eu leur place parmi les utilisateurs et les militants de l' Esperanto.

Bravant les difficultés inhérentes à tous les problèmes que pose l' existence d' une revue à diffusion internationale, "Espero Katolika", née en 1903, continue à tenir sa place dans la diversité de la presse espérantiste mondiale.

Il est remarquable que IKUE a acquis une certaine notoriété dans les milieux chrétiens et jusqu' à Rome; Radio Vatican émet chaque deux programmes en notre langue; il importe que ces émissions soient écoutées et soutenues par les lettres des auditeurs.

Voici venu le moment de la reprise d' activité pour les membres de notre Association. Chacun d' eux doit se comporter en espérantiste convaincu; sympathisants, consacrez quelque temps à l' étude de la langue; puis au delà, que chacun se perfectionne en pratiquant la lecture, la correspondance, la conversation. Il est nécessaire de participer à l' action des groupes locaux, de soutenir l' Union Française pour l' Esperanto, d' apporter son concours à tout ce qui a pour but la diffusion et l' épanouissement de la Langue Internationale, et les richesses culturelles dont elle est porteuse.

Mais pour nous, nous devons travailler à mettre au service des milieux chrétiens ce merveilleux de communication et de compréhension. Il faut des traductions des livres saints, des rituels irréprochables au point de vue de la langue, une littérature religieuse de qualité, des textes oecuméniques. Ce qui se fait attend l' aide et le soutien de tous, selon les moyens et les compétences.

Nous devons élargir l' idée que nous nous faisons de notre mouvement pour que progressent les multiples services que l' Esperanto peut rendre à la communication, à la culture, au progrès, et, pour notre part, ce qui est essentiel; à l' élévation spirituelle de toute la communauté humaine.

R. Cl. COLAS

XX

PREĜO

Jam malaperas la suno, sed Vi, eterna lumo,
Unusola Dio, Feliĉega Triunuo,
Elverŝu Vian amon en niajn korojn.

Matene ni kantas Vian laŭdon,
Vespere niaj preĝoj ankoraŭ supreniras al Vi.

Degnu aŭskulti nian alvokon:
Ni finfinē laŭdkantu Vin meze de la Sanktuloj!

Preĝo de la unuaj kristanoj.

XX

RADIO ROMA - ESPERANTO

LA PAPO KAJ LA ORIENTEUROPAJ LANDOJ

teksto de Cappellani, trad. de De Salvo

El la nova sidejo de la Aŭstra Radiotelevido en Vieno, la Papo sendos venontjare, dum la planata vizito al Aŭstrio, mesaĝon al la orienteŭropaj landoj, kaj tiel li "plene espeimos sian eŭropecan penson". La Papo estas konvinkita eŭropisto - diris la Primaso de la aŭstra katolika Eklezio, kardinalo Franz König-kaj Aŭstrio, centro ne nur geografia de Eŭropo, sed ankaŭ historia kaj kultura, estas la ideala podio por mesaĝo de kontinenta unueco." La papa vizito havos lokon okaze de la kvara kongreso de la aŭstraj katolikoj, kiu komenciĝos per granda aranĝo dediĉita al la temo "Eŭropo, heredaĵo kaj sindevigo de la kristanoj." La kongreso okazos koincide kun la tricentjara datreveno de la forpelo de la turkoj el Aŭstrio. Pridemandite, ĉu tiel oni intencas festi la venkon de kristanismo super islamismo, kardinalo König respondis, ke jam delonge li strebas organizi en Vieno konferencon, kum la partopreno ankaŭ de elstaruloj de la islama mondo.

ITALA EPISKOPARO

teksto de Moretti, trad. de De Salvo

Firma deklaro de la komisiono "Justeco kaj Paco" de la itala Episkopara Konferenco, pri la brita-argentina milito. "Kiel homoj kaj kiel kristanoj - ĝi diras - ni rifuzas la neraciecon ĉu de postvivintaj kaj anakronismaj formoj de koloniismo, ĉu de la apliko de armita forto por superi ilin." La deklaro aldonas, ke "la vojo de repaciĝo kaj intertraktado, en la respekto de la justeco (inkluzive de la rajtoj de la loĝantaro rekte koncernata), restas la sola, efika solvo inda je du grandaj nacioj, kiuj inspiriĝas el la samaj valoroj, moralaj kaj kulturaj, de civila kunvivo."

XX

NIA MEMBRARO

Novaj bonfarantaj membroj: 7) S-ro PERRIN (Paris)

Dankegon!!

INTERNACIA ESPERANTO PILGRIMADO EN LOURDES (5/12-an de aprilo 1983)

FKEA organizas tiun pilgrimadon, kiu okazos de mardo 5-a posttagmeze ĝis mardo 12-a posttagmeze.

La pilgrimantoj loĝos en la belega "Institution des Soeurs de l' Assomption", 21, avenue Antoine Béguère 65100 LOURDES

Generala temo: "ESPERO EN KRISTO KAJ LIA DIPATRINO"

A) Ĉiumatene: Spiritaj Ekzercoj (prelego kaj interŝanĝo) pri la ĝenerala temo + Diservo en Esperanto.

B) Posttagmeze: Mardon: vizito de Lourdes. Merkredon: vizito de la Hejmo S-ta Petro (Katolika Helpejo). Ĵaŭdon: ebla inaŭguro de la renovigita tombo de Pastro Peltier, kreinto de "Espero Katolika", okaze de la 80-a datreveno de la revuo: 1903/83. Vendredon: krucvojo: prelego kun lumbildoj. Sabaton: diservo; tut-taga ekskurdo al Gavarnie. Dimanĉon: pilgrimadon al Bartrès kaj diservo en la paroĥa preĝejo. Lundon: partopreno en la Procesio de la Sankta Sakramento; lumbildoj pri la vivo de S-ta Maximiliano Kolbe.

NOTOJ: 1) kompreneble kelkaj aliaj spiritaj ekzercoj estos prezentitaj kaj faritaj, ekz. la rozario. Ankaŭ kelkaj specialaj kunvenoj povos utile okazi.

2) la institucio situas kontraŭ la Groto, kiu estas atingebla en kelkaj minutoj. La partoprenantoj disponos sufiĉe da libera tempo.

3) la prezo estos sufiĉe modera: ĉirkaŭ 90 FF tage (ĉio emtenata: loĝado en unulita ĉambro kaj manĝoj)

4) aliĝo: ĝis la 31-a de decembro 1982: 100 FF

ĝis la 28-a de februaro 1983: 120 FF

5) KORESPONDADO, unu sola adreso: FKEA BP 54 49150 BAUGE Franci.

6) por la pagoj, unu sola poŝtĉekkonto: Association Catholique Française pour l' Esperanto 2324 93 N. ROUEN.

7) la Esperanto-parolantoj ne oficiale preĝis en Lourdes de post 1953. Ili ne povas preterlasi ĉi tiun okazon.

ESPERANTO PILGRIMADO EN LOURDES (5/12-an de aprilo 1983)

ALIĜILO

NOMO kaj VOKNOMO:

ADRESO kaj TELEFONO:

Mi aliĝas al la pilgrimado en Lourdes

Mi bezonas (ne bezonas) fervojan rabatilon

Mi sendas: ALIĝo 100 aŭ 120 FF

RESTADO 90 x 7 630 FF

SUME

al la poŝtĉekkonto: Association Catholique Française pour l' Esperanto
2324 93 N ROUEN

Bonvolu sendi tiun aliĝilon nepre antaŭ la 28/2/1983 al ~~XXXX~~ FKEA BP 54
49150 BAUGE FRANCLANDO

Bonvolu plenigi UNU aliĝilon por ĉiu familiano. Petu ekzemplerojn de FKEA.

LA LASTA EKZILITO

Lia indigno havis neniajn limojn. Li gapis per grandaj okuloj, turnis al unu flanko al alia pilkoforman kapon kaj ne povis kompreni, kio, okazis. Ankoraŭ hieraŭ li estis ĉirkaŭata per aparta atento, li povis iri, kien li volis, ekdormeti, kie li deziris kaj frandi plej perfektan manĝaĵon. Kaj ĉiam li estis ĉirkaŭata de granda eskorto de zorgemaj servistoj.

Nun lin ĉirkaŭis per densa ringo militemaj, kiel al li ŝajnis, estaĵoj. Li klopodis forpuŝi ilin por iri antaŭen, kie estis bongusta manĝaĵo. Sed tio ne sukcesis. Oni lin ne nur ne tralasis, sed male puŝis malantaŭen, pli proksime al eliro.

Ankoraŭ fojon li provis traŝiriĝi el la ĉirkaŭaĵo, sed tuj li sentis, ke io krakis sur lia dorso. Li ne rimarkis, kiel kelkaj liaj malamikoj, armitaj per fortegaj dentoj, trafis sur lia dorso kaj rapide fortranĉis liajn plej gravajn organojn, kiuj fidele servis lin. Li terure "ekhurliis" kaj ne tiel pro doloro, kiel pro nepriskribebla furiozo, kiu kaptis tutan lian estaĵon. Lia vica provo ekliberiĝi, en kiu li metis tutajn fortojn, finiĝis ankaŭ senrezulte. Je la lasta momento, senkomplete premite al eliro, li ekrigardis siajn kunfratojn, esperante ricevi apogon, sed ili estis ne en pli bona stato. Kaj nun li estas jam tute ĉe la eliro. Ankoraŭ unu - du puŝojn - kaj li senhelpe falas malsupren.

Kiam li falis, dum unu momento aperis antaŭ li tiu aŭrora mateno, kiam li kune kun aliaj virabeloj strebis laŭ abelreĝino en la ĉielan, inunditan per sunradioj, altecon. Li estis pli forta ol aliaj. Energie pligrandigante rapidecon, timigante siajn rivalojn per fortega zumado, li preskaŭ atingis la celon.

La deziranta momento.

Sed kio estas tio? Verŝajne oni preterpasis lin...

La virabelo, kuŝante en amaso de aliaj senflugiligitaĵoj kaj jam senspiraj kunfratoj, ekstremis unu-du foje kaj kvietiĝis, rigidiĝinte de matena malvarmo.

- Ŝajne tio estas la lasta ekzilito de la abelujo, - indikante al la silentinta virabelo rimarkis la abelisto. De tempo al tempo mi bedaŭras ilin, sed kion fari - tia estas leĝo de la naturo.

- Guste, - konsente kapjesis mi. - Sed pleje mi bedaŭras, ke oni nomas ilin virabeloj.

Semjon DUBRAVA, trad. A. Apollo

LINGVA ANGULO

Pro la somera libertempo, verŝajne, alvenis nur 3 respondoj al la proponitaĵoj de la n^o 133, nome de S-roj BOURGOIS (B), DEGOUL (D) kaj S-ino MICHAU (M). Jen iliaj tradukoj:

- 1) il ne ferait pas bon s' y frotter: preferinde ne tuŝi lin, li estas dornhava (B); sufiĉe malagrablus tion tuŝi (D); ties frotado kaŭzus pikon (M).
- 2) fuir ses responsabilités: eviti sian prirespondecon (B); forfuĝi siajn responsojn (D); eskapi el siaj prirespondecoj (M).
- 3) il peut toujours se fouiller: li neniel esperu, liaj esperoj estas tute vanaj (B); li ne klopodu siajn poŝojn traserĉi (D); li vane povas esperi (M).
- 4) il faut faire gaffe: necesas tre atenti (B); atentindas (D); ni ne mistrafu, necesas atentegi (M).
- 5) gagner de l' argent à la pelle: amase enspezi monon, esti superŝutata per mono (B); monom ŝovelamase gajni (D); facile riĉegiĝi (M).
- 6) un gagne-petit: etenspezanto (B); gajnetulo (D); etprofitaĵo (M).
- 7) il a gagné haut la main: li supervenkis (B); li ne ete gajnis (D); li gajnis senrezerve (M).
- 8) il a gagné le cocotier: li plene malsukcesis (B); li gajnis la mirindan loton (D). (1)
- 9) gagner son paradis: permeriti sian paradizon, esti paradizmerita (B); elmeriti paradizon (D); perade meriti paradizon (M).
- 10) ce n' est pas de gaieté de coeur: tute ne volonte, ne senŝanceliĝe (B); tion mi ne ĝoje faras (D); ne korkontentige (M).

Tria klasifiko: 1) en egaleco: S-ino MICHAU kaj S-ro BOURGOIS X(13); 3) S-ro DEGOUL (7); 4) S-ro DAUCHEZ (1)

Novaj tradukotaj esprimoj proponitaj de S-ino Michau kaj S-ro Bourgois:

- 1) travailler d' arrache-pied; 2) être gêné aux entournures; 3) peu ou prou; 4) je m' en garderai bien; 5) garder la tête froide; 6) c' est du gâteau; 7) à la gare, les ballots; 8) les gens du voyage; 9) glisser la pièce à quelqu' un; 10) il est gonflé à bloc.

(1) Laŭ la vortaro "Larousse Universel", la ĝusta esprimo estas "gagner le cocotier", kaj signifas triumfi, venki. Sekve, neniu el la proponitaj tradukoj plene taŭgas.

INFORMBUKEDO

1) Luis Hernández Yzal Av. Generalísimo 13 SANT PAU D' ORDAL (Barcelona) Hisp. serĉas la numerojn 44, 46, 52, 54, 55, 56, 57, 58, 59, 60, 61, 62, 63, 64, 65, 66, 67, 68, 69, 70, 71, 72, 74, 75, 76, 78, 82, 83, 84, 85, 86, 87, 88, 89, 90, kaj ok numerojn aperintajn dum la jaroj 1955, 1956, 1957 kaj 1958; krome mankas al li el la unuaj jaroj: 1947: 2, 3, 4; 1948: 1, 2, 3, 4; 1949: 3, 4; 1950: 2; 1952: 1, 4; 1953: 1, 4; 1954: 1, 2. Tio estas por la kolekto de Hispana Esperanto Muzeo. Kiu povas helpi lin?

2) Komence de septembro aperos speciala duobla ilustrita numero de "Heroldo de Esperanto", entute dediĉita al la 67-a UK en Antverpeno. La numero enhavos detalajn raportojn kun bildoj pri la kongresaj laboraj, kulturaj kaj distraj programoj, intervidiĝoj kun la ĉefaj kongresaj figuroj, same kiel raportojn pri la aliaj manifestacioj: Junulara Kongreso en Loveno, Infana Kongreseto, Blindula Kongreso k.t.p. Oni povas peti senpagan ekzempleron de tiu kongresa numero de la redakcio: Heroldo de Esperanto, Calle de Juan Ramon Jimenez 28, 6^o A, Madrid 16 Hispanujo.

ESPERANTO EN RADIO

<u>Ĉiutage</u> 0.30-1.00 Pekino	19,78	26,00 m			
	15165	11515 khz			
7.30-8.00 Varsovio	41,27	48,90	50,04	75,85	200 m
	7270	6135	5995	3955	1503 khz

13.00-13.25	Varsovio	31,50	41,99	m				
		9525	7145	khz				
13.00-13.30	Pekino	30,4	19,8	m				
		9860	15100	khz				
15.00-15.30	Pekino	19,7	16,9	m				
		15165	17745	khz				
18.30-18.55	Varsovio	41,18	49,22	m				
		7285	6095	khz				
21.30-22.00	Varsovio	41,18	49,22	m				
		7285	6095	khz				
22.00-22.30	Pekino	19,80	26,2	30,1	m			
		15150	11145	9965	khz			
23.30-23.55	Varsovio	41,18	49,22	50,04	75,85	200	m	
		7285	6095	5995	3955	1503	khz	

Dimanĉe 7.45-7.57 Vieno 48,74 24,97 13,95 m
6155 12015 21500 khz

21.05-21.15 Vatikano 196 48,47 48,31 41,38 31,17 31,10 25,64 19,84
1530 6190 6210 7250 9625 9645 11700 15120

Lunde 19.20-19.25 nur por Lille regiono "Expression Nord" 94,7 mhz. FM (3-an lundon)

20.00-20.15 Berno 75,28 48,66 31,46 m
3985 6165 9535 khz

22.30-22.45 Berno same

Ĵaŭde 7.10-7.30 Vatikano 48,31 41,38 31,17 25,61 25,55 19,84 m
6210 7250 9625 11715 11740 15120 khz

20.00-20.15 Berno kiel lunde

22.30-22.45 Berno "

Sabate 18.45-19.00 Vieno 48,74 30,71 19,28 m
6155 9770 15560 khz

20.00-20.15 Berno kiel lunde

22.00-22.20 Romo 25,42 30,90 41,24 m
11800 9710 7275 khz

22.30-22.45 Berno kiel lunde

Skribu al ĉiuj radiostacioj por ke Esperanto audiĝu sur la ondoj; v. la adresojn sur p. 10 en n° 132 de FKE.

ENHAVO: Bileto de la Prezidanto, R.Cl.Colas p.1-2; Preĝo, Radio Roma, Nia membraro p. 2; Pilgrimado en Lourdes p. 3; La lasta ekzilito p. 4; Lingva angulo, Informbukedo, Esperanto en radio p. 5,6; Kotiztabelo p. 6.

KOTIZTABLELO 1982

IKUE kun "Espero Katolika" 60 F
Peranto: P. Degrelle c.c.p. NANCY 2 555 38 L.

ACFE kun "Franca Katolika Esperantisto" 20 F
Infanoj ĝis 16-jaraj, pastroj, religiul(in)oj 10 F
Bonfaranto 100 F
Dumviva membro 400 F

UFE kun "Revue Française" 125 F
UEA kun "Esperanto" kaj Jarlibro 135 F

Abono al "Biblia Revuo" 36 F
Assoc. Cathol. Franç. pour l' Esperanto c.c.p. ROUEN 2 324 93 N.

Dépôt légal: 3ème trimestre 1982 !! Polycopié par F. M. C.

C. P. P. n° 62 532 !! Prieuré St-Martin
!! La Houssaye-en-Brie

Directeur-gérant: Roger Despiney !! 77610 FONTENAY TRESIGNY FRANCE